BULTENO de REU

№ 90, Septembro 2017

Vizito de alilandanoj enkadre de karavanoj al UK

Ĉi julie Moskvon vizitis 2 grupoj de alilandaj esperantistoj, kiuj transite veturis al la 102-a Universala Kongreso en Seulon.

Por la gastoj estis organizita interesa, alloga, riĉenhava programo. En la unua grupo, kiun iniciatis So Gilsu, estis 14 personoj el Koreio, Japanio, Pollando, Nederlando kaj Hispanio. La duan grandegan grupon el 40 personoj (kiun organizis Tatjana Loskutova sub aŭspicio de REU) konsistigis esperantistoj el Germanio, Francio, Svislando, Bulgario, Usono, Belgio.

La gastoj ĝuis profesian ĉiĉeronadon tra belega moskva metroo, vizitis Ruĝan Placon, Kremlon, Kolomenskoje, promenis en Arbato. Treege interesa kaj neforgesebla estis busekskurso tra la grandega urbo: oni admiris Kliniĝan Monton, Universitaton, antikvajn stratetojn de la urba centro, Novvirgulinan monaĥinejon kaj multon alian.

En unu el vesperoj niaj amikoj plezure spektis la dancensemblon "Kostroma" en la Teatro de rusa kanto. Ŝipumado laŭ la rivero Moskva malgraŭ pluva vetero lasis agrablajn rememorojn. Eta muzeo de rusa vodko neniun lasis indiferenta, oni eksciis interesajn faktojn el historio de vodko en Rusio. Por renkontiĝi kun alilandaj esperantistoj al diversaj rendevulokoj venadis moskvaj esperantistoj, tio manifestaciis, ke Esperanto vivas kaj ne bezonatas interpretistoj.

Malmultaj tagoj traflugis rapide, kontentaj gastoj forveturis el Moskvo al Bajkalo, Vladivostoko, Seulo...

Grandan dankon al helpantoj, akompanantoj, kunagantoj en tiom grandioza laboro pri akcepto de alilandanoj!

Svetlana Smetanina